

HISPANA ESPERANTO

Ilustrita ĉiumonata gazeto, por la propagando de Esperanto kaj diskonigo de la Historio, Arto, Literaturo, folkloro kaj naturaj belaĵoj, de nia lando.—Redakcio: Glorietta de Bilbao, 5.

Julio Mangada Rosenörn.—MADRID

II ^a JARO	NUM. XII.—DECEMBRO	II ^a JARO
-------------------------	--------------------	-------------------------

AL LA ESPERANTISTARO

Korajn salutojn kaj ĉiajn bondezirojn por la nova jaro; al la hispana, plie, jen:

Mi kredas, ke vi havas grandan kontenton, ĉar nia Asocio, spite de ĉio, plinombrigas, pligravigas kaj sukcesadas pri rilatoj kaj atento de aŭtoritatuloj. Espereble kaj esperinde, tiu kontento estos des pli granda, ĉar nia Asocio, dum la venonta jaro, elpruvos sian praktikan utilon al siaj membroj per praktikaj ricevotaĵoj. Des pli ni atingos, deflankigante niajn personaĵojn kaj partikularajn vidpunktojn pri la movado, unuigante ĉe la ĝenerala vidpunkto, kiu ju pli simpla estu kaj ju pli da libereco kaj elasteco permesu al la esperantistoj ĝenerale, des pli konvena kaj fruktodona. Ĉiuj devas celi, ke neniu esperantisto restu for de la Asocio dum la venonta jaro.

Julio Mangada Rosenörn



Monahejo Montserrat   la fama montaro de
la sama nomo, apud Barcelono.

PRI NIA MOVADO

Ĉar oni pretendas ŝanĝi la nunan organizon de nia Asocio, argumentante ke ĝi ne estas taŭga kaj konvena; ĉar oni diras pli-malpli pri kvazaŭ *unu sola volo reganta la Asocion*, pri *unupersona direktado*, laŭ ĝenerala senco; ĉar oni ne konkretigas kaj precizigas faktojn por kulpigi aŭ kondamni ies konduton, estas tute dece kaj konvene alporti al la samideanoj klarigojn, kiuj kune kun la komentarioj al la nuna regularo kaj diroj pri ĝia akcepto dum la Kongreso de Madrido (vidu n-ron. de ĉi tiu gazeto, kiu aperigis ilin), vidigos senpartie, klare, evidente, la realan staton de nia Asocio, kiun Kongreso mem povos kontroli kaj konstati, ĉar diro sen elpruvo ne estas atentinda, kaj super ĉio kulpigoj postulas pruvojn. Tial mi reinsistas, dirante esti dece kaj konvene konigi faktojn, por ke la samideanoj formu sian propran opinion, kaj neniel pli bone ol per la gazeto, kiu, laŭ eblo, helpis, helpas kaj helpos, la hispanan esperanto-movadon ĉe la plej lojala plenumado de la nuna regularo spite de kiu ajn persona opinio.

La Kongreso de la jaro 1926, en Madrido (Majo-Junio) aprobis la nunajn statutojn, kiujn leĝigis la Ĝenerala Polica Direkcio la 10.^{an} de septembro de la sama jaro. De la Kongreso de Cordoba (1925), kiu aprobis provizore regularon, ĝis la fino de la jaro 1926, la Asocio vivis provizoran vivon, dum kiu, laŭ notoj de la tiama trezoristo (bedaŭrinde mortinta) S-ro Johano Carrasco, la Asocio kalkulis proksimume 80 membrojn (la originalaj atestoj ekzistas, ĉar en la Ĝenerala Polica Direkcio estas nepre necese prezenti ilin por ke la Asocio staradu leĝe). Tial, oni povas konstati, ke nia nuna H. E. A. ekvivis sian normalan vivon je 1927, de post la oficiala leĝa aprobo de la regularo kaj enregistra en la Ĝenerala Polica Direkcio. Dum ĉi tiu jaro, oni liveris 282 membrokartojn, t. e., la nombro da membroj de H. E. A. por ĉi tiu jaro estis tiu, 282: la progreso estas evidenta. Dum 1928, la membrokartaro atingis la numeron 409, tial dum la jaro oni liveris, do, 127 novajn membrokartojn, t. e., aligis dum la jaro 127 novaj esperantistoj; sed la nombro da membroj dum ĉi tiu jaro, ne estas donata de la numero 409 de la lasta membrokarto liverita, ĉar estis eksigoj pro diversaj kaŭzoj, la naturaj eksigoj kiel en ĉiuj Asocioj okazas, sed

ĉi tiuj ekziĝoj estis malmultaj kaj konstateblaj, same kiel la aliĝoj, kaj la komparo vidigas same, kiel por la antaŭa jaro: la progreson de la Asocio. Kaj ni atingas la jaron 1929, dum kiu la membrokartaro atingas la numeron 500, kaj same, kiel la antaŭa jaro, okazis naturaj ekziĝoj, pro diversaj kaŭzoj, sed ĉiam malmulte pli ol aliĝoj, kaj la rezulto estis la sinsekvado de la progreso de la Asocio, kiu laŭ laboro, entuziasmo kaj preparo de la samideanoj en ĉiuj lokoj, estos eksterordinare kontentiga por la venonta jaro.

La kalkuloj prezentitaj dum la Kongreso de Oviedo vidigas klare per la enspezitaj kotizoj la realan progreson de nia Asocio. Nu; ĉu ĉi tiu progreso atingita devis esti multe pli granda? La respondo estas tre simpla: jes; sed ĉi tio estus fariĝinta realaĵo se idealo pura gvidus ĉiujn, se personajn vidpunktojn flankenlasus iuj, kaj se aliaj, kiuj sin alnomas esperantistoj, estus aliĝintaj, kelkaj eĉ kun la familianoj esperantistaj, kaj trenintaj esperantemulojn al nia Asocio. Kaj pri ĉi tio ne estas dubo, konsciante esti loko, ekzemple, en kiu estas sufiĉe multenombraj samideanoj supermezurante du centojn la grupiĝintoj, kaj tamen ne estas deko el aliĝintoj al H. E. A. spite de la pionireco de iuj, kiuj rezultas la plej aktivaj kaj entuziasmaj reformemuloj kvankam ĉi tio ŝajnu esti paradokso.

Kaj mi demandas al tutserenaj spiritoj, ĉu la progresado ne estas rimarkinda? Nur spiritmiopulo, malkontentemulo aŭ personemulo, povas respondi nee; sed, tial ke mi tute klare volas elpruvi la progreson, mi daŭrigas la argumentadon per faktoj konstatitaj kaj kontroleblaj: la nombro da aktivaj membroj estas nun proksimume 450; tial, dum du jaroj, ni gajnis 370 membrojn, kaj ni komparu nian membraron kun tiuj de aliaj naciaj Asocioj enkalkulantaj la tutlandan teritorion kaj funkciantaj firme de antaŭ multaj jaroj, laŭ elĉerpitaĵoj de Oficialaj dokumentoj de la Internacia Movado, kiel estas la libroj de la Kongresoj de Antverpeno (1928) kaj de Budapest (1929): la Belga Ligo Esperantista havis 652 membrojn dum 1928, kaj dum la nuna jaro atingis ĝi la nombron 841, sed atentu bone, ke ĵus okazis la dua Universala Kongreso en Antverpeno; la Brita Esperanto-Asocio, al kiu kuniĝis antaŭ kelkaj jaroj la Skota, por formi tutlandan unuigon, havis 1000 membrojn dum 1928, kaj sur la Kongreslibro de Budapest ne aperas la nombro da

membroj, sed tial ke aperas la kotizoj pagitaj sur la Kongreslibroj de Antverpeno kaj Budapest, oni rimarkas la pagojn: 693 svisajn frankojn (1928) kaj 632 svisajn frankojn (1929), pro kio oni povas konscii, ke la nombro da membroj malaltiĝis; la Franca Societo por la propagando de Esperanto havis 1502 membroj dum 1928, kaj 1578 dum ĉi tiu jaro; la Germana Ligo en Ĉeĥoslovakio havis 1500 membrojn je 1928, kaj sur la kongreslibro de Budapest ne aperas la nombro da membroj dum ĉi tiu jaro, tamen devis altiĝi la nombro, ĉar la pago dum 1928 estis 146,35 svisaj frankoj, kaj 175 svisaj frankoj dum 1929; la Germana Esperanto-Asocio (tutlanda) aperas dum 1928 kun 1500 membroj, kaj kun la sama nombro dum ĉi tiu jaro; la Japano Esperanto-Instituto, kun 1500 membroj dum la pasinta jaro, kaj kun 2000 dum la finiĝanta; Sudslava Esperanto-Ligo, kun 650 membroj, dum 1928, aperas sur la Kongreslibro de Antverpeno, sur tiu de Budapest, nenio aperas pri ĝi; la Svisa Esperanto Societo havis 400 membroj dum la pasinta jaro, nuntempe ĝi kalkulas 533, kaj atentu, ke Svisujo estas sidejo de U. E. A. kaj jam okazigis tri Kongresojn, same atentu, ke Germanujo okazigis du, oni povas diri tri, enkalkulante tiun de Dantzig, kaj Anglujo ankaŭ tri. Pri la ceteraj Asocioj estas nenio rimarkinda por nia celo. Tute klare evidentiĝas, per la komparo nia progreso, des pli atentante, ke la Kataluna-Baleara Federacio estas aparta organizaĵo en la tutlanda teritorio kaj ke nur malmultaj samideanoj de tiuj du hispanaj regionoj apartenas al H.E.A., kaj ke la Esperantista Ligo de Hispanaj Fervojfisticistoj ankaŭ estas aparta organizaĵo el kiu nur malmultaj ĝiaj membroj estas ankaŭ de H. E. A.; kaj el ĉi tio naskiĝas demandoj: Kia estus nia tutlanda Asocio se la Kataluna-Baleara Esp.-Federacio agus same, kiel faris la Skota koncerne la Britan Esp.-Asocion, kaj se la Ligo de hispanaj esp. Fervojistoj fariĝus fako de H. E. A.? Kia progreso estus al H. E. A., se ĝiaj nunaj membroj laborus senpartie por kaj pro la bono de nia afero, varbante novajn esperantistojn, kaj super ĉio tuj konvinkante la multenombrajn samideanojn de siaj rondoj ankoraŭ ne aliĝintajn por la tuja aliĝo al H. E. A.? Post la komparo kaj koncio pri la demandoj, ĉiuj fervoraj lojalaj esperantistoj restos konvikitaj pri nia sukceso, nur tiu, kiu kritikadas aŭ agadas


por triumfigi sian personan opinion ĉe organizaĵo, por kiu nenion faris aŭ faras, malatentos, kaj restos nekonvinkata.

Sed ankoraŭ mi ne finis por elpruvi nian progreson kaj sukceson: jam de tri jaroj, la Ministerio de P. I. oficiale ordonas inspekti la laboron de H. E. A. kaj donas al ĝi subvencion, kiu ĉi tiu jaro estis pli alta kaj kiun la ministro promesis ankoraŭ pli altigi por la venonta jaro, ricevinte grandan impreson pro la vizito al Foiro de Gijon kaj kaŭze de la ekspozicio el esperantaĵoj; oficiale la Ĝenerala Direkcio por Unua Instruado de la aludita Ministerio, pro peticioj al la ministro, decidis jam du kursojn por geinstruistoj de Madrido (la dua disvolvigadas nune) la duan kun plej grandaj avantaĝoj por la gepartoprenantoj, kaj ĉiufoje la kursoj pli kaj pli sukcesos, ĉar la geinstruistaro jam atentis nian aferon kaj la Ministerio konscias la gravecon de esperanto, doninte luksajn gravajn altvalorajn librojn por premii la Lernejojn, kiuj partoprenis la Internacian Ekspozicion de la Kongreso de Oviedo. Ĉi tio okazadas jam en nia lando dank' al la laboro de H. E. A.; kaj ĉi tio ja estas sukceso, ĉar ĵus la Komisiono por Unuecigo de la Tutmonda Esperanto-Movado, kunveninte en Budapesto, sin turnante al ĉiuj Asocioj, rimarkigas la neceson konkeri la geinstruistaron, nian de antaŭ iom de tempo entreprenitan celon. Dum kunveno de la Kongreso de Antverpeno (1928), germano proponis filmi la Universalajn Kongresojn, kaj respondinte al li, la Sekretario de la Int. Centra Komitato, S-ro Kreuz, esprimis ne esti mono por tio, pro kio mi parolis esprimante, ke la naciaj Asocioj imitu la Hispanan Esp-Asocion, kiu filmis la Kongreson de Madrid (kaj ĵus oni filmis la Kongreson de Oviedo); tial, ĉi tio elpruvas, ke H. E. A. marŝas en la avangardo. Iuj naciaj Asocioj (du-tri) eldonis nacilingvan tradukon de la raporto de D-ro. Nitobe al la Ligo de Nacioj pri Esperanto, kaj ni eldonis 5000 librojn. «¿Qué es el Esperanto?» ampleksigante kaj riĉigante la tradukon de la raporto per malgranda esp-gramatiko, per traduko de la «Eksperimento de Eccles», per kolekto de gravegaj opinioj pri esperanto, per priskriboj pri U. E. A. kaj aliaj esp-aferoj. Ĉu alia nacia Asocio faris pli? Ni okazigis, de la Kongreso de Cordoba eldoninta du belajn librojn pri ĝi, la plensukcesintajn Kongresojn de Madrido, de Sevilla kaj de Oviedo; la dua post-lasis mirindan restaĵon, la Kongreslibron, kiu supermezuras

ĉiujn librojn aperintajn pri Universalaj Kongresoj ĝis nun; la tria postlasis la mirindan iniciativon de la aludita Internacia Ekspozicio, krom la filmo same, kiel la Madrida postlasis alian filmon. Kaj mi povus paroli pri aliaj sukcesoj de H. E. A. ĉar la sukcesoj de Hispana Esperanto-Instituto estas ankaŭ ĝiaj: la eldono de du rimarkindaj diplomoj (elementa kaj supera), el kiuj ĝi disdonis sufiĉe multenombrajn pro faritaj ekzamenoj; la «Demandaro-Respondaro» por la elementa kurso, kiun sindoneme presis kaj donacis al la Instituto nia samideano Julian Garcia Aguirre, per kiu ni povas unuigi la instruadon. Kiu alia nacia Asocio havas similaĵojn? Kaj mi ne parolas pri fondo de Grupoj, pri la semado kaj burĝonado ĉie, pri la rekonkero de lokoj en kiuj esperanto ĉu mortis aŭ endormiĝadis, pri helpado por starigo eĉ de Federacioj.....

Kiu volu konscii, konsciu; kio volu konstati, konstatu.


Julio Mangada Rosenörn.



MEMORINDAJ DATOJ DE DECEMBRO

El ĉi tiu monato estas tagoj tre rimarkindaj: la 1.^a de 1902, pro la fondo de la Svisa Esperanto Societo, kaj la 1.^a de 1906, pro la fondo de Sveda Esperantista Societo; la 9.^a de 1902, pro la starigo de la unua Bohema Societo Esperantista «Esperantista Klubo de Praha»; la 15.^a de 1859, pro la naskiĝo de nia glorega Majstro Ludoviko Lazaro Zamenhof; la 17.^a de 1879, ĉar la Majstro festis ĉe amika rondo la ekvivigon de la «lingwe uniwersala»; la 20.^a de 1917, pro morto de la eminenta prezidanto de la Esperanto Akademio rektoro Boirac.

Ĝenerale la Grupoj ĉie okazigas je la 15.^a festojn por honoriri nian karegan kaj gloregan Majstron.



Monañejo Montserrat.

INTERNACIA EKSPOZICIO DE LERNEJAJ LABORITAĴOJ

Neniel estos sufiĉe laŭdata la iniciativo de la Loka Kongreskomitato de Oviedo por fari la unuan paŝon al ĉi tiu plej grava elpruvo pri utilo de esperanto, tial mi, relaŭdante senĉese la iniciatintojn, reinsistas malgraŭ la jam aperintaj sciigoj ĉe la Kongresraporto; plengoje reinsistas, kun la espero, ke ĉiuj spertu kaj firme konsciu la gravecon de tiu iniciativo de la samideanoj de Oviedo, kaj decidu ĝin daŭrigi por ke ĝi fariĝu konstanta kaj por ke eksterlandaj samideanoj imitu ĝin. Unuan fojon en la esperanta vivo ĉi tio okazis kaj la hispanaj esperantistoj havas la grandan honoron, ke niaj fratoj de Oviedo estu malfermintaj novan horizonton por la elprovado de utileco de esperanto. Ni interrilatigu la lernejojn per esperanto, ĉar de la lernejoj vere venos la tutmonda paco nur per esperanto.

26 Lernejoj naciaj kaj fremdaj partoprenis la Ekspozicion:

Lernejo «Pepin Rodriguez», de Colloto (Oviedo).

- » de la Fonditaĵo «Rionda Alonso», de Noreña (Oviedo).
- » Nacia «Altamira», de Oviedo (4.^a premio).
- » Nacia de la Normala Lernejo por viroj de Oviedo.
- » Nacia de la Provinca Infanrifuĝejo de Oviedo.
- » Nacia por infanoj de Gilena (Sevilla.) (2.^a premio).
- » Nacia n.^o 18^a por infanoj de Madrid.
- » Nacia de Cuellar (Segovia).

Popol-Lernejo de Svennevad (Svedlando-Nerke). Instruisto S-ro Karl Linus Andren.

M. U. L. O. School de Soerabaia (Nederlando-Hindio. Java). Instruisto S-ro S. J. Ysselstein.

H. G. P. School de Burntisland (Skotland, Fife). Instruistino F-ino Euphemia Andersen.

Lernejo de Helsinki. (Finnlando). Instruistino F-ino Elmi Tamminen (Fredrikintatu, 68 A).

Lernejo de Valga. (Estonio). Instruisto S-ro Peeter Enits.

Council School, Street Beaumont, de Huddersfield (Anglujo).

Lernejo de Polonio.

II.^a Lernejo de Oslo (Norvegujo) (I.^a Premio). Unuigo de

Norvegaj Instruistoj. Instruistino F-ino Rosa Bye.—Hermann Fossgate, 10.

Sagene Lernejo de Oslo (Norvegujo). Sama adreso.

Lernejo Bjölseen de Oslo (Norvegujo). Sama adreso.

Lernejo de Japanujo.

Lernejo de Holbaek (Danujo). (III.^a Premio). Instruisto S-ro Holger Hansen. Ringstedvej, 17.

Drieborg Lernejo (Nederlando). Instruisto S-ro Pieter Korte (Drieborg Nieuwe Schans—Groningen).

Werner-Siemens Real Gymnasiun de Berlin.

Real Lernejo de Hamburg.

Overbergschule (Mädchen) de Allenstein (Germanujo), Instruisto S-ro B. Pfeiffer. Zimmer str. 2. Allenstein, Ost, Preusen.

Lernejo de Campo San Martino (Italujo-Padova). Instruistino F-ino M. Marchesi.

Gohlis Lernejo de Dresden (Germanujo). Instruisto S-ro Walter Hanh. Gohlis. Dresden post Gosseband.

Granda devas esti nia ĝojo, ĉar la hispana samideanaro montras vojojn sekvindajn al fremdaj samideanoj, nun same, kiel ĉiam, ekzemple: en Antverpeno, dum la Kongreso germana samideano parolis pri esperantaj filmoj de la Kongresoj, k. t. p., kiel tute grava afero, por ke la Internacia Centra Komitato tion entreprenu, kaj parolinte la Sekretario de I. C. K. por esprimi neeblecon al la afero, mi rimarkigis ke la afero jam estis entreprenita de Hispana Esperanto Asocio, kiu havas filmon de la Kongreso de Madrido al kiu nuntempe ni aldonos tiun de la Kongreso de Oviedo, kaj ke same povas fari la naciaj asocioj dum la I. C. K. havas monrimedojn por tio. Tute same ni povus diri pri aliaj aferoj kiel pri flagoj kaj standardoj, ĉar multaj el niaj Grupoj de antaŭlonge ilin havas, kaj ili estas sufiĉe riĉaj.


Antaŭen en konkordo kaj nelacigebla kunlaborado al nia komuna celo!

ATENTU PRI GRAVA NIA GASTO

Inter la delegitoj nomitaj de Prezidanto Hoover por reprezentanti Usonon ĉe la Internacia Foiro en Sevilla, troviĝas Ekŝtatestro Fred R. Zimmerman, de la usona ŝtato Wisconsin.

Ĉar S-ro Zimmerman estas Esperantisto, la usonaj samideanoj petas por li la plej afablan akcepton dum lia kelkmonata vojaĝo en Eŭropo. Li alvenis ĉirkaŭ la mezo de Oktobro. Kompreneble nia honora gasto portas la Jarlibron de U. E. A. kiel ĉefan helpilon al la vojaĝanto.

La hispanaj samideanoj sin kondutos zamenhofe al S-ro Zimmerman same kiel sin kondutis al S-ro Christensen.



DEL EXTRANJERO

XXII CONGRESO UNIVERSAL DE ESPERANTO

Va se ha fijado la fecha del 2 al 9 de agosto de 1930 para el Congreso, que se celebrará en Oxford (Inglaterra), y se ha nombrado el Comité correspondiente:

Presidente del Congreso, Bernard E. Long; vicepresidente, Profesor W. E. Collinson; presidente del Comité local, Robert Robertson; cajero, Paul Blaise; secretario, C. C. Goldsmith; vocales: S-ra. M. L. Blaise, F. B. Bourdillon, J. Brenan, R. East, W. A. Gething, J. Merchant; vocales del Comité local: L. N. Newell, S-rita V. C. Nixon, W. J. Rayson, K. R. C. Sturmer y F. E. Wadham.

La correspondencia al secretario del XXII Congreso de Esperanto: 142, High Holborn. London, W. C. 1.

Los boletines de inscripción ya están disponibles en la oficina del Congreso, a la que pueden pedirse.

La cuota para todos igual, sin excepción, es de 25 francos suizos, siendo el medio más cómodo remitirla por medio de un billete de Banco de una libra, fácil de adquirir en cualquier Banco o Casa de cambio, y remitido certificado, bien por giro postal. *Después del 1.º de julio de 1930 la cuota será de treín'a francos suizos.*

Para evitar cualquier déficit del Congreso, no obstante los cuidados del Comité local con tal fin, se ha constituido un capital de garantía.

Serán muy agradecidos cuantos donativos se hagan a la Caja del Congreso para el mayor y más esplendoroso éxito del mismo, así como también todo auxilio económico remitido con objeto de facilitar la asistencia de ciegos al Congreso.

Sobre alojamiento aparecerán detalles en el próximo boletín, pero el Comité local no responderá del alojamiento que no haya sido encargado antes del 1.º de julio de 1930.

Cuantos pretendan organizar reuniones con ocasión del Congreso deberán anunciarlo con bastante anticipación. De igual suerte procederán los que pretendan declamar, cantar, etcétera, en los conciertos del Congreso.

Todo adherido al Congreso recibirá gratuitamente la revista «International Language» desde enero hasta agosto y después el número que contenga la reseña del Congreso; pero si el congresista fuese suscriptor de dicha revista es de esperar no deje de abonar la suscripción, por lo que recibirá dos ejemplares, rogándole dé uno de ellos para propaganda.

SERIE DE CONFERENCIAS DURANTE MEDIO AÑO EN SUECIA

Encontrándose en Suecia para estudiar los trabajos manuales en las escuelas y la literatura sueca el joven maestro indio Lakshmi Sinha, profesor en la escuela de Tagore, Santiniketan (Casa de la Piedad), junto a Calcuta, por casualidad se topó con un anuncio sobre esperanto, y, decidido a aprender la lengua, en seis semanas se puso en condiciones de utilizar la lengua auxiliar internacional para venir desarrollando una serie de conferencias notables sobre la escuela de Tagore, sobre la cultura hindú, sobre sus viajes y enseñanzas a través de Europa sobre cuestiones sociales, pacifistas y culturales. Por toda Suecia viaja este joven profesor y continuará viajando, utilizando el esperanto en su labor y valiéndose de los compañeros esperantistas suecos, que le sirven de traductores cuando no se dirige a un público esperantista.

XVI CONGRESO DE ESPERANTISTAS BÚLGAROS

En Vidin, junto al Danubio, se reunieron unos 300 samideanos búlgaros y unos cuantos más de Rumanía, Hungría, Yugoslavia, etc., del 28 al 30 de julio próximo pasado.

En la pequeña, pero risueña e importante ciudad desde el punto de vista del tráfico, se desarrollaron los actos del Congreso con verdadero esplendor y alegría, alternando las fiestas y diversiones con las sesiones de trabajo; en una de éstas se dió cuenta del estado del movimiento esperantista en Bulgaria, resultando existir 27 grupos, con un total de 488 miembros.

OFICINA ESPERANTISTA POR COMERCIO Y TURISMO EN FIRENZE (ITALIA)

Nuestro compañero Carlo Rossini acaba de establecer esta Oficina, que gratuitamente atiende a cuantos soliciten informes y visiten la cuna de Dante y capital del arte renacentista italiano. Sobre todo los esperantistas, tanto turistas como industriales, comerciantes, etc., puede dirigirse a la Oficina o Agencia en solicitud de los informes necesarios. Dirección: Via Pinzochera, 18.

EL TRÁFICO INTERNACIONAL Y EL ESPERANTO

Según la Memoria del representante del Ministerio austríaco de Comercio y Tráfico, ingeniero Erwin Deinlein, presentado en el V Congreso Internacional de Propaganda, en Varsovia (septiembre último), «la cuestión de la aplicación del esperanto para la atracción de extranjeros, tratado ya en el anterior Congreso, en Budapest, ha dado un gran resultado a nuestro Ministerio mediante el prospecto «Austria»; como evidencian numerosas comunicaciones y artículos en la prensa esperantista, la aplicación del esperanto se ve con simpatía en los medios comercial y turístico. La edición del folleto resultó tanto más útil, pues más de 700 extranjeros esperantistas de 30 países visitaron Viena con ocasión de la apertura del Museo Internacional de Esperanto en la National-Bibliothek. También muchos

diarios extranjeros hablaron acerca del progreso turístico alcanzado por Austria con el esperanto, por lo que el Ministerio se decide a continuar la aplicación de la lengua de Zamenhof para la atracción de extranjeros».

Aprendan con lo anterior las organizaciones comerciales, industriales y turísticas, como todos los organismos que se preocupan de encauzar en el país una gran corriente extranjera.

LEGADO AL ESPERANTO

En Christchurch (Nueva Zelanda), la S-ra Enson, secretaria honoraria de la Asociación Esperantista de Nueva Zelanda, ha legado en su testamento 500 libras esterlinas para el establecimiento de clases de esperanto en dicha ciudad, a la «The Workers' Educational Association» (Asociación Educativa Obrera) de dicha ciudad. Habiendo cuidado muy bien en su disposición testamentaria que las clases estén bien garantizadas y no entorpezcan los demás estudios. Este caso es digno de ser imitado por cuantos poseen suficientes medios de fortuna, y más digno aun si lo hiciesen en vida, auxiliando económicamente el desarrollo del esperanto y realizando así una de las más grandes acciones altruistas.

AGENCIA COMERCIAL UNIVERSAL

(Allgemeiner kaufmännischer Verkehrsdienst)

En la capital austríaca acaba de fundarse esta Sociedad con objeto de facilitar prácticamente por medio del esperanto toda clase de servicios impuestos por las necesidades de la vida actual. Con tal fin se suplica a cuantos esperantistas en distintos lugares interesen el asunto y quieran ser corresponsales lo comuniquen a la Sociedad «Universala Komerca Trafikservo», Viena, 1 y Herrengasse, 2; para lo cual el corresponsal no tiene que abonar cuota alguna ni cargar sobre sí una labor obligatoria especial, puesto que el corresponsal mismo decide sobre su colaboración. Pídanse informes detallados a la dirección indicada, pues el servicio gratuito y esmerado que se ofrece abar-


ca, puede decirse, todo cuanto concierne al comercio, la industria, las finanzas, la navegación, el turismo, el arte, la literatura etc., etc.

RUS A

El resultado de la labor de la Sovieta Esperantista Unio durante el año que va a terminar no alcanzó el objetivo que se proponía, llegar a 5.000 miembros activos; pero puede afirmarse su éxito, pues llegó a alcanzar 4.523 socios activos y 895 simpatizantes en todo el territorio de la Unión de Repúblicas Soviéticas. Aquí, como en todos los pueblos, el movimiento esperantista no se puede juzgar por los esperantistas organizados.

EL TURISMO Y EL ESPERANTO

Prospectos y guías aparecen continuamente: en Brighton (Inglaterra), Budapest (nueva edición), Chemnitz (Sajonia), Hradec-Králové (Checoslovaquia), Kassel y Linz (Austria). Piostany (Checoslovaquia), Wiesbaden (3ª edición). La Oficina Austriaca de Turismo, de Viena, acaba de publicar un artístico prospecto sobre Austria.




LLAMAMIENTO

De vosotros mismos depende el mayor o menor, el más rápido o más lento desenvolvimiento de nuestra Asociación Esperantista Española; así, pues, cuantos la integramos debemos: pagar lo antes posible nuestras cuotas para el año 1930; convencer a los esperantistas aislados que se acojan a nuestras filas; conseguir que los que ya estuvieron con nosotros reingresen; redoblar nuestras fuerzas para reclutar el mayor número de adeptos. Estamos entrando en una nueva época del movimiento esperantista en España y fuera de España, y, existiendo en nuestro territorio una gran fuerza esperantista disgregada, si conseguimos encauzarla sin merma de las aspiraciones indi-

viduales, locales y regionales, como los Estatutos de H. E. A. respetan, daremos un gran paso hacia adelante. La franca y leal colaboración de todos, el apoyo moral y económico posible de todos, incluso del Instituto Español de Esperanto que se está coronando de gloria por sus ya reconocidos trabajos, serán poderosos auxiliares de la Directiva para que H. E. A. en el 1930 dé un gran paso hacia adelante; y como este paso no puede darse sin medios económicos y la cuota de miembro que marca el Reglamento es muy modesta, la Directiva, en uso del artículo del Reglamento que la autoriza a variarla, decidió continúe de DOS PESETAS, no obstante la IX.^a decisión del Congreso de Oviedo, pues, de otra suerte, tendría que verse obligada a disminuir en gran parte la suma de 200

(Continúa en la pagina 17.)



NOVA FIRMA PAŜO AL NIA CELO

Oficiala Gazeto n.º 301 de la 28.^a de Oktobro de 1929. Paĝo 556.—Ĝenerala Direkcio de Unua Instruado.

Kaŭze de la peticio de S-ro Julio Mangada Rosenörn, per kiu li konigas la finon de la esperanta kurseto por Ĝeinstruistoj de Madrido, starigita de ĉi tiu Direkcio, akompanante Raporton pri ĝi kaj petante samtempe rajtigon por klarigi alian saman kurseton dum unu monato, laŭ esprimado de la Raporto.


Ĉi tiu Ĝenerala Direkcio decidis komplezi la peticion de la petinto, rajtigante lin por okazigi la aluditajn kurson dum la proksima monato novembro en la Normala Lernejo por Viroj, de Madrid, de la 4.^a posttagmeze ĝis la 5.^a kaj 1/2 kaj tial estas malfermata la enregistro por la kurso en la citita Lernejo, por ke la Instruistoj kaj Instruistinoj, dezirante ĝin partopreni, povu ĉeesti ĝin ne okazigante baron al siaj taskoj en siaj Lernejoj.

Ĉi tion mi diras al via Moŝto por scio kaj sekvoj.—Dio gardu vian Moŝton dum multe da jaroj.—Madrido la 19.^{an} de Oktobro de 1929.—La Ĝenerala Direktoro, *Suarez Somonte*.—Al S-ro Ĉefinspektoro de Unua Instruado de Madrido.

(Continuación de la página 16.)

pesetas anuales que paga al Comité Central Internacional para tener VOZ y VOTO en él, reducción que, en los actuales momentos, no es aconsejable y que por el contrario habrá que aumentar en su día, quizá no lejano, para conseguir la influencia y consideración a que nuestra Asociación tiene derecho en el concierto universal esperantista. Por otra parte, considerando que la Asociación no progresará si no demuestra su utilidad a los asociados, y teniendo proyectos conducentes a proporcionar esa utilidad, en forma que supone para el asociado en principio una compensación superior a los dos reales en que se reducía, la Directiva se afirmó en la conveniencia de no rebajarla.

A todos desea el más próspero año nuevo en nombre de la Directiva.—*El Secretario*, MARIANO MOJADO.



NÚEVO PASO FIRME HACIA EL OBJ TIVO

Gaceta Oficial número 301 de 28 de octubre de 1929. Página 556.—Dirección General de Primera Enseñanza.

Vista la instancia de D. Julio Mangada Rosenörn, en la cual manifiesta que, habiendo terminado el cursillo de Esperanto que se autorizó para maestros de Madrid, remite la Memoria del mismo, suplicando al mismo tiempo se le conceda la explicación de otro cursillo igual, durante un mes, conforme a lo expuesto en dicha Memoria.

Esta Dirección General ha resuelto acceder a la petición del solicitante, autorizándole para celebrar el referido curso durante el mes de noviembre próximo, en la Escuela Normal de Maestros de Madrid, de cuatro a cinco y media de la tarde, y a este efecto, queda abierta la matrícula de dicho curso en la citada Escuela para que los maestros y maestras, que lo deseen, puedan asistir al mismo, dejando atendida la enseñanza en sus escuelas.

Lo digo a V. S. para su conocimiento y demás efectos.—Dios guarde a V. S. muchos años.—Madrid, 19 de octubre de 1929.—El Director General, *Suárez Somonte*.—Señor Inspector Jefe de Primera Enseñanza de Madrid.

ENLANDA KRONIKO

Madrid.—La Hispana Esperanto-Asocio, sin turnis al Ministerio de Publika Instruado petante, ke, ĉar oni postulas al la lernantoj de Esperanto en la Universitato de Valencia, kie de antaŭ dudek jaroj oni klarigadas la lingvon, plenumi la Leĝon same, kiel al la lernantoj de aliaj lingvoj, pri impostoj, k. t. p., kaj tamen profesoroj ne enspezas ion pro la klarigado kaj nenion donas al la lernantoj la Universitato, la Ministerio donu al esperanto saman rajton, kian la Leĝo donis al modernaj kaj malnovaj lingvoj, ĉar alimaniere estus maljuste. Ankaŭ oni sin turnis al la dirita Ministerio por ke almenaŭ la Ĝenerala Direkcio por supera kaj dua Instruado aperigu sur la Oficiala Gazeto klarigojn pri la R. O. permesanta klarigi esperanton kaj eviti tiel diversajn kriteriojn nefavorajn al la klarigado de la lingvo en Universitatoj, Institutoj, k.t.p. Parole, dum vizito al la Ĝenerala Direktoro, S-ro Miguel Allué, kiu estas konvinkita amiko de esperanto, por prezento al li de la diplomo de Honora Membro de nia Instituto, oni atentigis lin pri la esperanta movado kaj necesa helpo per decidoj favoraj de la Ministerio, laŭ la peticioj aluditaj, kaj monhelpo. Verŝajne esperanto eniras vojon pli favoran al sia progreso en nia lando.

La Ĝenerala Direkcio de unua Instruado de la koncernata Ministerio decidis novan kurson por geinstruistoj de Madrido dum la monato novembro. Certe ĝi ankaŭ konsentis saman kurson por Zaragozo pro peticio sekve de la unua kurso, laŭ klarigoj aperintaj kaŭze de la tre interesa raporto al la Ministerio farita de la klariginto, en kiu aperas la sinceraj impresoj pri la lingvo de la geinstruistoj ĉeestintaj la kurson, ĉar la gvidinto faris kopiojn por dissendi al ĉiuj regionoj, konsciante, ke varbado de la instruistaro estas grava paŝo al nia sukceso.

Grava propaganda festo okazis en la Popoldomo, organizita de la Laborista Grupo, kun multenombra ĉeestantaro. Elokvente, dokumentite kaj konvinkante, parolis la socialista pioni-ro Cayetano Redondo post trafantaj vortoj de la Prezidanto de la Grupo kaj legado de aliĝoj altvaloraj de personoj kaj Asocioj. La oratoro elpruvis tute klare, ke esperanto estas la solvo rapida vera kaj tutefika por la interkompreniĝo de la tutmonda laboristaro, kiu, ju pli la tempo pasas, des pli bezonas kunaga-

di; ke esperanto, do, estas la lingvo speciale por la proletarioj pro sia facileco, ĉar ĝi ne postulas monajn kaj intelektajn penadojn, kaj la laboristo post mallongedaŭra lernado konstatas ĝojege sian parolkapablecon esperantan eĉ skriban por interrilatiĝi kun homoj el ĉiuj popoloj. Estis legado de versaĵoj hispane-esperante, kaj la horeto de la Grupo «Antaŭen» kantis hispanajn kaj fremdajn popolkantojn kaj la «Esperon» esperante. La Laborista Grupo plensukcesis, ĉar tuj enskribiĝis por la nova kurso pli ol kvindek personoj.

En la Ateneo funkcias nova kurso, ankaŭ en la Normala Lernejo por viroj funkcias la kurso por geinstruistoj. Oni preparas novajn kursojn aliloke, kaj la Grupo «Antaŭen» sin preparas por okazigi vastan planon el propagandaj festoj kaj paroladoj.

KATALUNUJO

Pli kaj pli sukcese niaj samideanoj de ĉi tiu regiono rekonstruas sian ĉiam gravegan esperanto-movadon. La nova Komitato de la Katalun-Baleara Esper-Federacio vigle laboras kaj jam revivigis la bonegan gazeton «Kataluna Esperantisto», nuntempe modeste sed praktike ĝi aperas, kaj la afero esperigas ĝian baldaŭan brilan aperon, ĉar entuziasmo renaskiĝos, kunlaborado frata sur tute neŭtrala esperanto-laboro rapide refortigos la novan Federacion. Plenĝoje ni, la ceteraj hispanaj esperantistoj vidas la renaskiĝon kaj deziras al katalunaj samideanoj plej grandan sukceson.

Barcelono. — En la sidejo de la Federacio, S-ro Anglada, la 5^{an} de septembro faris gravan paroladon pri la viena internacia Muzeo kaj la Kongreso en Budapeŝto, instigante al aliĝo por starigi en Barcelono potencon esperanto-institucion, kaj certe la klera oratoro trafis la atenton de la multenombraj reprezentantoj de esperantistaj grupoj, kiuj ĉeestis al tiu celo. Fine, S-ro Francisco Vila recitadis kelkajn versaĵojn.

La Kataluna-Baleara Esp. Federacio ĵus elektis la jenan Komitaton: Prezidanto, Angel Valdepeñas; Vic., Juan Campdelacreu; Sekretario, Tomás Bernabé; Vic, Francisco Gorgues; Kasiso, José Anglada; Kalkulisto, Francisco Vila; Bibliotekisto, Fernando Montserrat.

Niaj samideanoj Campdelacreu kaj Gorgues vizitis la mal-

novajn samideanojn de Tarragona por ĉi tie reorganizi la lokan movadon.

Ĉe la Akademio «Espero» S-ro Delfi Dalmau, pleninterese disvolvigis paroladon pri la moderna materialo por instrui lingvojn per geniaj ideoj, akcentigante ke la kursoj devas esti tute praktikaj (la kronikisto de longe tion praktikadas, kaj kosntatis ke, super ĉio por esperanto-praktika lingvo, tiel devas esti). Fine, li aŭdigis kelkajn diskojn «Linguaphone». La kompetenteco de S-ro Dalmau bone impresis la aŭskultantaron.

La grupo «Esperanta Juneco», de la kvartalo Poblet, aligis al la K.-B.-E.-F., kaj organizis novajn kursojn elementajn kaj alian superan. La Avangarda Junularo Instruanta kun ĝia fako «Juneco» — strato Valencia 387 — meritas laŭdojn pro sia kultura laboro.

«Barcelona Stelo» — Borrell, 253 — organizis kurson, kiu okazadas lundoj, merkredoj kaj vendredoj, de la 9.^a ĝis la 10.^a vespere. Same faras «Paco kaj Amo» — Planeta, 16 —, «Enciclopedia Akademio Esperanto» — Galileo, 40, Sans — kaj «Nova Sento» — Wad Rás, 195 —. Aliaj kursoj estas preparataj.

La Esperantista Renkontejo — Durán y Bas, 8, pral — regule kaj plensukcese funkciadas. La stato de la kaso estas tre bona kaj la servoj faritaj de ĝi estas rimarkindaj. Ĵurnalnotoj, leteroj respondantaj al diversaj demandoj, akceptoj de fremduloj, k. t. p., meritis dankesprimojn. La nombro da protektantoj kreskas.

Gravega tasko estis prezenti al la Barcelona Urbeŝtraro komplete dokumentitan raporton pri la inaŭguro de la Internacia Esp-Muzeo en Vieno kaj pri la Universala Kongreso de Budapeŝt; sukcese tion faris niaj kompetentaj kaj agemaj samideanoj Rocamora kaj Anglada. Ĉi tiu raporto grave influos la Urbeŝtraron por plej bona atento al nia afero. Ekzemplero de la raporto estas ankaŭ ĉe la arĥivo de Hispana Esperanto Asocio. Ni dankas kaj laŭdas niajn samideanojn.

ASTURIO

Gijon. — Intense la pioniroj de esperanto agadas: la Astura Esp-Asocio kunvenis la 10^{an} de oktobro, je la 20^a, por distribui la instruadon de la lingvo inter la oficialaj profesoroj, por

klasigi la lernantojn fiksan normojn, por prepari temojn por la proksima ĝenerala kunveno, kunvokita de la prezidanto S-ro Menéndez Rua. Pastro Fournier ne nur vigle agadas ĉe Gijon, sed en la tuta regiono, ĵus dank'al li, la Katolika Junularo de la tre grava karbomineja loko La Felguera, organizis Esperantistan Grupon, farante propagandon per la gazetaro.

La Laborista Ateneo malfermis specialan kurson nur por naciaj geinstruistoj dum unu monato.

Cabruñana.—La paroĥestro, nia simpatia samideano S-ro Albarellós, kuraĝigite de la Ovieda Kongreso reentreprenis la laboron esperantan.

Trasona.—Ĉi tie ankaŭ la laboro intensiĝas.

Generale la movado vigliĝas en la tuta regiono kaj promesas grandan disvastiĝon de la lingvo.

GALICIO

Orense.—Denove la esperanto-laboro antaŭeniras per nova kurso. Nia tre kompetenta samideano, Direktoro de la Norma la Lernejo por viroj, S-ro Amor Rolan, post grandaj ĉagrenoj, sin dediĉas entuziasme al gravaj esperantaj aferoj.

Ferrol.—Pacienceme nelacigeble S-ro Olivan daŭrigas sian esperanto-laboron, tute singardeme kaj serioze ĉar en ĉi tiu urbo estas malnova esperantisto fariĝinta idisto, kiu estas grava persono kun sufiĉe da influo, pro kio la laboro de nia samideano estas plej laŭdinda, kaj li sukcese iom post iom vastigas la esperantan kampon kaj plinombrigas niajn adeptojn. Novaj kursoj malfermiĝis, kvankam pli ĝuste estus diri, la kursoj daŭradas.

En aliaj lokoj burĝonas nia afero.

EKSTREMADURO

Badajoz.—Ĉi tie, S-ro Redondo daŭrigas sian propagandon per aperigo de esperantaĵoj ĉiusemajne sur la enurba gazeta-ro, kaj kvankam ne tiel vigle kiel antaŭe la afero marŝas.

Cáceres.—Konstante S-ro Soler Valls, unu el niaj plej kompetentaj pioniroj, aperigadas gramatikajn artikolojn kaj alispekajn pri esperanto sur ĉefa ĵurnalo, altirante atenton ĉies kaj


vekante la esperantemon de malnova esperantisto dormanta. Jam, do, li ne estas sola en tiu urbo, kaj ni povas certigi ke per la kurso, kiun li gvidas la urbon li trafos al nia afero.

MURCIO

Antaŭe, ĉe Murcia, estis granda esperanto-movado dank' al influo de la eminenta arbarinĝeniero S-ro Ricardo Codorniu, nia unua nelacigebla hispana esperantisto; pli ol ducent esperantistojn dormantajn kaj esperantemulojn enkalkulas ĉi tiu urbo, verŝajne estos eble veki sufiĉe nombrajn el ili kiam nia afero tiel evidente iras antaŭen, kaj tiun laboron celas fari vekiginto pro renaskiginta entuziasmo dank' al konscio pri la nuna stato de la enlanda kaj eksterlanda movado. S-ro Desiderio González entreprenas tiun laboron kaj ĉar li multe vojaĝas, ankaŭ li estos granda propagandisto.

ANDALUZIO

Peñarroya-Pueblonuevo.—Instruisto, S-ro Johano Corredo, pli kaj pli entuziasme laboras por kreskigi la nombrojn da samideanoj de sia Grupo «Zamenhof», ne nur per kursoj, sed organizante festojn kaj ekskursojn por kontentigi la samideanojn kaj allogi la publikon per la diroj de la partoprenantoj, elpruvante tiel ke esperanto estas multe pli ol sola lingvo. Ĝus li organizis ekskurson al la kamparo ĉe la bordo de la rivereto «Guadiato», por ordenigi «kavalirojn de la verda stelo» la dek unuajn lernantojn de sia lernejo. Post tagmanĝo, sur la ŝtonegoj de la bela pejzaĝo estis komuna fotografaĵo de la Grupo kaj fondo de la virina fako de la Grupo. Gaje reveninte al la vilaĝo, kantadante eĉ la Esperon, la Grupo «Zamenhof» zamenhofe salutas la hispanan esperantistaron, petante al la gazeto «Hispana-Esperanto» komuniku la saluton.





Monasterio Montserrat,

EL LA VERKO «SEN NOVAĴO ĈE LA FRONTO»

DE

ERICH MARIA REMARQUE

(Fragmentoj)

Por mi, la fronto estas malfeliĉega uragancentro. Kvankam oni sin trovu ankoraŭ malproksime de ĝi, ja oni rimarkas ĝian altirantan forton, kiu trenas malrapide sed nekontraŭstareble ĉar neniu povas sin liberigi el ĝi.

Tamen, de la tero, de l'aero, venas al ni defendaj energioj: de la tero super ĉio. Por neniu estas la tero tiel, kiel por la soldato. Ĉu la soldato ĝin brakpremas longedaŭre; forte; ĉu li enigmas profunde sian vizaĝon en la teron, siajn membrojn, korprenate de la paniko naskata de la pafado, tiam la tero estas lia sola amiko, lia frato, lia patrino. La soldato enfermas siajn kriojn kaj sian timon en la koron de tiu silentulo, en tiun gastaman ejon. La tero brakpremas la soldaton kaj lin liberigas poste por ke li vivu kaj antaŭeniru dum dek sekundoj. Kaj denove ĝi lin brakpremas, foje por ĉiam. Terol... Terol!... Terol!...

Per siaj sinoj, la Tero, per siaj faldaĵoj kaj kavaĵoj, ĉe kiuj iu ajn povas kaŭri aŭ sin kaŝi, naskis el si mem, meze de la konvulsioj de la teruro, ĉe la ektimo de la neniigo, ĉe la mortiganta blekego de la eksplodado, la potencegan kontraŭondon de la rehavigita vivo, Terol! La freneza turniĝo de niaj estaĵoj, preskaŭ jam disĉifonigataj, sumiĝis al ĝia vivohavo; vivohavo elŝprucanta abunde el niaj manoj, penetranta en niajn korpojn, kiam en ĝin sin enterigis la postvivantoj, kiam ĉi tiuj ĝin mordis dum la muta feliĉo terura pro minuto rabita al danĝero.

Per salto ni malantaŭeniras milojn da jaroj, je la eksplodo de la unua grenadaro. Estas la besta instinkto, kiu vekiga en ni mem, kiu gvidas kaj protektas nin. Ne estas konscio, estas io pli rapida, pli prava kaj pli neerarebla, ol la klara percepto. Ne estas maniero por tion klarigi. Oni antaŭeniras, kaj pri nenio oni pensas; subite jen, ni kuŝas ĉe faldaĵo de la tero kaj la grenadaroj saltas en niajn korpojn; sed neniu povas rememori esti aŭdinta la alvenon de la kuglego, esti havinta la ideon sin kuŝigi. Se je tio estus necese fidi, jam nur restus el ni disigitaj

korperoj. Estis alia aĵo, estis tia instinkto klarvida, profunda, kiu kuŝigis nin kaj savis nin, ne sciante kiel. Sen ĝi, jam de antaŭlonge, ne restus homoj de Flandrujo al Vosgos.

Ni eliris el la kasernoj ĉu bonhumore ĉu malbonhumore; sed ni alvenis al la militkampoj, ĉe la fronto, kaj ni fariĝis homoj-bestoj.

.....

Ni revenas. Jam estas tempo por reveni al la ŝarĝaŭtomobiloj. La ĉielo akiras plej klaran nuancon. Jen, la trian matene. La vento malvarmiĝetas. Pala lumo grizigas niajn vizaĝojn.

Ni paŝadas, kvazaŭ blinduloj, laŭ india vico, unu post la alia, sur fosaĵojn kaj konuskavaĵojn, kaj ni reeniras la nebuligitan kampon. Katczinsky estas maltrankvila. Malbona signalo.

—Kio okazas al vi Kat?—demandis Kropp.

—Mi volus esti jam ĉe ni.

«Ĉe ni»... Tio estas: «Ĉe la barakoj».

—Ni ilin trafos post nemulte, Kat.

Li estas nerva.

—Mi ne scias..... Mi ne scias...

Ni alvenas al la tranĉeoj, kaj poste al la herbejoj. Reaperas la bosketo; ĉi tiun kampon ni tute bone konas. Jen la tombejo de la «Ĉasistoj», kun la tombaj teramasoj sur kiuj staras nigraj krucoj.

Je ĉi tiu momento eksibladas malantaŭ ni. La siblado pligrandiĝas, knaras, tondras. Ni estas kaŭrintaj... Cent metrojn antaŭ ni alteniĝas fajra nubo.

Je unu minuto, poste, boskoparto alteniĝas per puŝego de eksplodaro. Malrapide super la branĉarojn de aliaj arboj tri aŭ kvar arboj flugas tre alten, disbranĉiĝas, eriĝas. Jam siblas, kiel klapoj de kaldronegoj, la proksimaj grenadoj. Densa padado.....

—En teron!... —ekkrias iu—. En teron!...

La herbejoj estas plataj; la bosko, tre malproksima, estas danĝera. Nur la tombejo estas loko, por iu sin kaŝi kaj ŝirmi per ĝiaj tombaj teramasoj. En ĝin ni eniras rapidege, konfuze, meze de la mallumeco, faletante.

Ĉiu el ni kvazaŭ algluiĝas fulme kiel sputo post iu tomba teramaso.

Je ĉi tiu preciza momento la ombroj freneziĝas. Ĉio ŝajnas furioze danci. Sin ĵetas en nin gigantaj nigraĵoj, pli densaj ol la noktaj; saltas super nin. La subitheleco de la eksplodoj lumigas tremetante la tombejon.

Tra nenie estas eble forkuri. Mi serĉas dum la fulmohelo de la eksplodantaj grenadoj la herbejojn; ĉi tiuj estas kvazaŭ kole-rigita maro; la flamoj de la kuglegoj saltas tra la herbejoj kiel bruligitaj akvoŝprucoj. Estas neeble, absolute, al iu ajn preter-riri ilin.

Malaperas la bosko; ĝi disarbiĝas, disiĝas, polviĝas. Nepre ni devas resti en la tombejo.

Antaŭ ni saltas la tero, kiu poste falas en nin pluve. Mi sentas frapon. Kuglero rompis mian manikon. Mi fermas la manon, mi streĉas la pugnon. Ne estas doloro; sed mi ne trankviliĝas. La vundoj ne tuj doloras nin. Mi palpas mian brakon... ĝi estas haŭtosupraĵe vundita, ĝi estas sana. Tuj alia frapo: en la kranio. Mi eksvenas... Sed mi pensas rapide: neniel sveni. Okazas same kiel se mi falus en nigran kavaĵon; sed tuj mi resupraĵeniĝas. Greneron flugis en mian kaskon; sed de tiel malproksime ĝi venis, ke ĝi ne kapablis trabori ĝin.

Mi purigas miajn okulojn el koto. Antaŭ mi, mi vidas tre neprecize malfermitan grandan truon. Mi volas min enigi en ĝin, ĉar la grenadoj ĝenerale ne trafas facile la saman lokon. Per salto mi min ĵetas antaŭen kvazaŭ min ŝovante, kiel fiŝo...

Nova siblado. Rapide mi kuntiriĝas; mi esploras per la manoj kien mi min ŝirmi; mi tuŝas ion maldekstren; mi alpremiĝas al ĉi tio, kio cedas. Mi ĝemas, la tero malfermiĝas; ĉe miaj aŭdoj tondras la premata aero; mi rampas sub tion, kio cedas, ĝis kiam mi estas sube... Tio estas el ligno kaj tolo, tio min kovras, tio taŭgas por ke mi min kovru, malmultefike tio min ŝirmas kontraŭ la ŝrapneloj flugantaj suben, Mi malfermas la okulojn. Miaj fingroj prenas manikon, brakon... Ĉu vundito? Mi lin ekkrias... Li ne respondas. Mortinto. Mia mano palpadas lignerojn. Je ĉi tiu momento mi konscias, ke mi estas en la tombejo.

Sed la paŝado estas pli impresanta ol ĉio. Neniigas ĝi la racion. Mi rampas pli suben de la ĉerko. Ĉi tiu devas min protekti kvankam ĝi entenas la morton mem.

Antaŭ mi malfermiĝas la konuskavaĵo, mi ĝin havigas al mi per la okuloj kiel se ĉi tiuj estus manoj. Mi devas fali en ĝin per salto. Mi sentas baton sur mian vizaĝon; mano prenas min ĉe la ŝultro... Ĉu la mortinto reviviĝis? La mano skuas min; mi turnas la vizaĝon kaj ĉe la lumo fariĝanta po sekundoj, mi vidas la vizaĝon de Katczinsky. Li havas la buŝon tre malfermatan kaj krias; sed mi ne lin aŭdas; li min skuas forte, li alproksimiĝas pli... Momenton, kiam la bruo iom mallaŭtiĝas, min trafas lia voĉo:

—Gaso!... Gaaaso!... Gaaaso! Preterigu la ekkriion!

Mi prenas la maskon... Iom malproksime estas iu kuŝanta. Nur mi pensas ĉi tion: tiuj ankaŭ devas scii la danĝeron.

—Gaaaso!... Gaaaso!... Mi krias. Mi alproksimiĝas al li rampante, mi frapis lin per mia masko. Li ne atentis. Nur li kuntiriĝas pli kaj pli. Alian fojon, kaj alian, mi lin frapas—li estas rekruto—. Mi, senespere, rigardas Katczinsky'n, kiu sin survestis la maskon. Mia kasko flankeniĝas, falas; mi metas la maskon sur mian vizaĝon; mi trafas tiun najbaron, prenas mi lian maskon kaj mi ĝin metas sur lian kapon; li ĝin prenas; mi lin forlasas kaj subite, mi saltas en la konuskavaĵon.

Kun la tondrado de la kuglegoj kunmiksiĝas la surda krevadbruo de la gasgrenadoj. Oni aŭdas, kun la eksplodtondrado, sonorajn de sonorilo, tintiloj, metalbruigiloj, kiuj avizas tra ĉie: gaso..., gaso..., gaso!

Io falas malantaŭ min unu fojon, du fojojn. Mi purigas la vitraĵojn de mia masko el vaporo de la spiro. Estas Katczinsky, Kropp kaj alia. La kvar, ni, restas seriozege, streĉite, atente. Ni spiradas kiel eble plej subtile.

Ĉi tiuj unuaj momentoj de la spirado kun la masko survestita decidas la vivon aŭ la morton. Ĉu ĝi estos bone fermita? Mi konas la terurajn bildojn de la hospitalo, la gasmalsanulojn, kiuj, tutan tagon post tuta tago, sinsekve, sufokiĝante, vomas pulmojn laŭ bruligitaj ŝiritajoj.

Singardeme, alpremante la buŝon al la kapsulo, mi spiradas. Nun la gasvaporo rampas sur la tersupraĵo kaj enprofundiĝas en ĉiujn terfaldadojn. Kiel gelatena kaj larĝa besto, ĝi etendiĝas en nia konuskavaĵo, kvazaŭ ĝi volus sin lokumi tie oportune.

Mi antaŭenpuŝas Kaczinsky'n. Estas preferinde pli eliri kaj sin kuŝigi supren, ol resti ĉi tie, kie amasiĝadas pli la gaso. Sed ni ne tion faras reekhajlas ŝrapneloj. Tio estas pli ol ululado de grenadoj; tio estas kvazaŭ blekogado de la tuta tero.

Bruante surde, io nigra falas de supre en nin; tio estas ĉerko, kiun aeren flugigis eksplodo.

Mi rimarkas ke Kat moviĝas, kaj mi min metas apud li. La ĉerko falis sur la etenditan brakon de unu el ni: de la kvara. Li celas demeti sian maskon per sia libera mano; sed Kropp, ĝustatempe, prenas lian manon kaj, tordante forte lian brakon, restigas la manon lian sur lian dorson.

Kat kaj mi celas liberigi la vunditan brakon. La Kovrilo de la ĉerko estas rompita kaj malfermita; facile ni povas eligi tute ĝin; ni eltiras la kadavron, kiu glitas suben kiel sako. Poste ni celas apartigi la suban parton de la ĉerko.

Feliĉe la vundito svenas, kaj Alberto (Kropp) povas helpi nin. Ne estas necese atenti pri lia masko, kaj ni laboras tiom kiom ni povas, ĝis kiam la ĉerko cedas kun krakado pro la forto de la fosiloj kiel leviloj.

La tago antaŭeniras. Kat prenas lignaĵon el la kovrilo kaj metas la lignopecon sub la frakasitan brakon, kaj ni ĉirkaŭas la brakon kaj lignopecon per la bandaĝoj el niaj pakajetoj. Momente, ni ne povas fari pli, plu.

Mia kapo estas saturata de zumadoj kaj resonadoj interne de mia masko; ĝi estas proksima je eksplodo. La pulmoj estas superŝargataj de la penado; ili ĉiam enhavas la saman varman kaj eluzitan aeron. Mi estas je momento de la eksufoko...

Malrapide invadas nin griza lumo. Blovas la vento tra la tombaroteramasoj. Mi rampas sur la bordon de la konuskavaĵo. Je la malklara ektagiĝo mi vidas eltranĉitan kruron: la boto estas tute sendifekta. Tion ĉi mi vidas rapide. Sed iu ŝariĝas nun iujn metrojn malproksimen. Mi purigas la fenestretojn; denove ĉi tiuj maldiafaniĝas pro la emocio; mi rigardas pli atenteme tien... La vizaĝo de la homo estas senmaska.

Mi atendas sekundojn. Li ne falas, rigardas ĉirkaŭen kaj paŝas... La vento forigis la gason, la aero estas pura... kaj mi metas eksvenante mian maskon kaj falas teren. La aero pene-

tras en min kiel fluo el malvarma akvo. Miaj okuloj nebuliĝas, mi min sentas inundata de ondo, kiu enprofundigas min en mallumecon.

La eksplodoj ĉesis. Mi revenas al la konuskavaĵo kaj mi signalas al la aliaj. Ili grimpas supren kaj nudigas siajn vizaĝojn. Ni alkturas al la vundito kaj lin prenas. Iu subtenas la brakon. Tiel rapide, ni malantaŭeniras.

La tombejo estas detruita kampo. Disigite kuŝas ĉie ajn kadavroj kaj ĉerkoj. Oni mortigis denove ilin; sed ĉiu el ili, detriugante, savis unu el ni.

La palisaro estas erigita; depremitaj la reloĵoj de la militfervoj, torditaj en la aeron. Iu kuŝas antaŭ ni. Ni haltas; nur Kropp iras kun la vundito.

La kuŝanto estas rekruto. Lia kokso estas sangtrempita. Ĉar li estas tre malfortigita, mi pretigas mian aluminian kruĉeton en kiun mi enigis teon kun rumo. Kat detenas mian manon kaj sin klinas en la vunditon.

—Kien oni vundis lin?

Li movas la okulojn. Lia malforteco estas tiel granda, ke li ne povas respondi.

Ni malfermas singardeme, tranĉante, lian pantalonon. Li ekĝemas.

—Silentu, silentu. Baldaŭ ci estos pli bonfarta.

Ĉu la kuglo vundis la ventron, li devas trinki nenion. Li ne vomis. Bona signalo. Ni malkovras lian kokson: ĉi tiu estas maso el karno kaj osteroj. La artikolo estas detruita. Ĉi tiu knabo neniam povos jam paŝi.

Per trempita fingro mia, mi malsekigas liajn tempiojn kaj mi devigas lin trinki. Liaj okuloj heliĝas iom. Nun ni vidas ankaŭ lian dekstran brakon sangelsprucanta.

Kat malvolvas du bandaĝpakajetojn kiel eble plej larĝe, por ke la bandaĝo ŝirmu la tutan vundon. Mi serĉas tolaĵon por firmigi la bandaĝitaĵon. Nenion mi trovas, tial mi ŝiradas la pantalonon por elĉerpi el la kalzono ligilon por la bandaĝitaĵo. Sed la vundito ne havas kalzonon. Mi rigardas lin pli atenteme: li estis la blonda knabo aludita antaŭe. (Pri kiu la verkisto ra-

kontas, ke li fekis en sian kalzonon pro paniko, kaj al kiu la verkisto konsilis demeti la kalzonon.)

Dume Katczinsky serĉadas ĉe la poŝoj de unu el la mortintoj pli da bandaĝoj. Ĉi tiujn ni ĉirkaŭmetas ĉirkaŭ la vundo, singardeme, kaj mi diras al la knabo, kiu rigardadas nin senĉese.

—Nun ni serĉos brankardon.

Tiam li malfermas la buŝon kaj susuras:

—Restu ĉi tie.

Kat respondas:

—Jes, tuj ni revenos. Ni iras serĉi brankardon.

Ni ne scias ĉu li tion aŭdis. Li ĝemas post ni kiel infano:

—Ne foriru!

Kat turnas la kapon kaj diras mallaŭte:

—Ĉu ni devas preni revolveron kaj per ĉi tiu simple fini? Estas malfacile ke la knabo povu rezisti la transporton, kaj maksimume, li vivados dum kelkaj tagoj. Kaj ĉio, ĝis nun estas nenio, kompare je tio, kion li suferos ĝis la morto. Ĉar nun li estas en plena impresego kaj li nenion sentas. Post unu horo, li estos amaso el nesufereblaj doloroj eksplodanta laŭ kriegoj. Tagojn de lia vivo estos nur al li terura martirigo. Kaj, ĉu al kiu estas utila, ke li vivu plu, tagojn?

Mi gestjesas kaj diras.

—Jes Kat; plibone estas per revolvero...

—Donu ĝin al mi—li diras.


Kaj li haltas. Li estas decidata; mi tion ĉi rimarkas. Ni rigardas ĉirkaŭen... Sed ni ne estas jam solaj. Antaŭ ni organiziĝas grupo, aperas kapoj el la konuskavaĵoj kaj fosaĵoj.

Ni serĉas brankardon. Kat balancigas sian kapon dirante:

—Ĉi tiuj knaboj, tiel junaj...

Kaj insistas:

Ĉiuj estas kiel knabinoj...



Monasterio Montserrat.

HISPANA ESPERANTO-ASOCIO gravege progresas kaj plenumas la rolon por la disvastigo de Esperanto en la tutlando; tial estas devo de Esperantisto aliĝi al ĝi kaj varbi por ĝi novajn adeptojn. La kotizo estas DU pesetoj (unua kotizo 2,50 pro la membrokartoj). Sendu la kotizon al la sekretario, S-ro Mariano Mojado, strato Abascal, 13, Madrid. Se vi sendus samtempe TRI pliajn pesetojn por subteni la propagandon per ĉi tiu gazeto vi ricevos akurate kaj ĉiumonate ĝin.

Eksterlandanoj, sendintaj KVIN sv. fr., ricevos la gazeton.

Ĉiu sendu la monon poŝtĝire al S-ro Mojado kaj enlandanoj povas pagi per poŝtmarkoj en rekomendita letero.

INTERŜANĜO nur po du specimenoj.

Gazeton, presaĵojn, materialon, k. c., sendu al la Redakcio.